

Oficiala organo de Kuba Esperanto-Asocio

## ENHAVO

### Speciala eldono pri kulturo kaj historio

- |  |          |
|--|----------|
| ☞ Enkondukaj vortoj<br><i>Julián Hernández Angulo</i>                                  | 3        |
| ☞ Klarigoj ĉiam validas<br><i>Juan Ramón Rodríguez Gómez</i>                           | 4 - 6    |
| ☞ Esperanta ekspozicio ankoraŭ rondvojaĝas<br><i>La Redaktoro</i>                      | 6        |
| ☞ Eltiru plej bonajn spertojn...<br><i>Julián Hernández Angulo</i>                     | 7 kaj 10 |
| ☞ Gratulojn, Santillán<br><i>Juan Ramón Rodríguez Gómez</i>                            | 8 - 9    |
| ☞ La tempo urĝigas nin<br><i>La Redaktoro</i>  | 9        |
| ☞ Eĥoj el Santiago<br><i>Juan Lázaro Besada Toledo</i>                                 | 11 - 13  |
| ☞ Soneo 6 (poezio, Nicolás Guillén)<br>Esperantigis: <i>Maritza Gutiérrez González</i> | 14 - 15  |
| ☞ Esperanto en Ameriko<br><i>Juan Ramón Rodríguez Gómez</i>                            | 16       |


## Estimataj:

Pro la fakto ke Esperanto ankaŭ estas kulturo, kaj la lasta kvaronjara periodo de KEA rezultis ege kulturriĉa, **Avanco** aperas ĉi foje al tiu temo dediĉita.

Sekve, vi trovos ĉion rilatan al 2-a Kuba Kultura E-Festivalo, en Santiago de Kubo, eĉ kelkaj historiaj aferoj.

Ĝuu nian enhavon, survoje al nia 3-a Nacia Kongreso, kie multaj el ni renkontiĝos.

Via redaktoro,



## NACIA ESTRARO

\***Julián Hernández Angulo**  
Prez.. Atentas plenumon de ĉiuj taskoj kaj fakoj.

\***Maritza Gutiérrez González**  
Ĝenerala Sekr.. Kontrolas internan agadon.

\***Alberto Rodríguez Pineda**  
Financoj, k. administrado de la Centra Oficejo.

\***Héctor Jiménez Batista**  
Instruado k. ILEI-Sekcio.

\***Juan Ramón Rodríguez Gómez**  
Informado, Historio, Bibl. k. Libro-servo kaj Ameriko. Ĉefredaktoro de **Avanco**, **La Noktuo** kaj **Universo**.

\***Pedro Fernández Rodríguez**  
Kulturo. Artaj k. klerigaj aranĝoj.

### Komisiitoj

\***Martha Alonso Gutiérrez**  
Turisma agado

\***Juan Lázaro Besada Toledo**  
Atento al verkistoj.

\***Alberto García Fumero**  
Scienco kaj tekniko.

X-a jaro, nro. 2 (3/98, sep.-dec.) Aperas 3 foje jare (aprilo, aŭgusto kaj decembro) / Eldonas: Kuba Esperanto-Asocio / PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo / Telefonnumeroj: 401364 kaj 404484 / Fakso: 53 7 33 8729 / Retadreso: kubesp@ip.etcসা.сu / Ĉefredaktoro k. grafika aranĝo: Juan Ramón Rodríguez / Kunlaboris: Julián Hernández, Juan Lázaro Besada kaj Maritza Gutiérrez / Revizio k. korektado: Maritza Gutiérrez / Komputila aranĝo: Roberto Molina / Prezo: 1:00 CU 15 (enl.), 2.00 NLG aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: keaux-u / Ĉiuj rajtoj rezervitaj / Reproduktado permesata (indiki fonton k. sendi 2 ekz. al la Redakcio).

«(...) Eo estas lingvistika fenomeno, socia fenomeno, sed ankaŭ kultura fenomeno. Ni ne rajtas forgesi pri tiu ĉi aspekto, kiu estas ege grava por ni kaj kiu donas utilon al nia movado k., pro tio, al nia lingvo. Tio signifas ke mi volas ke vi konsciiĝu ke E-o ne nur estas lernejo aŭ klasoĉambro. E-o estas multe pli ol tio (...) ni daŭre devas ekspluati ĉiujn eblecojn por profiti la diversajn kulturajn instituciojn k. por pliriĉigi la e-istan movadon tra la tuta lando, surbaze de niaj rilatoj kun profesiaj k. amatoraj artistoj kaj ke nia esperantistaro pli kaj pli konatiĝu kun la historio kaj kulturo de nia movado.

«Jam en kelkaj podioj, lokoj, renkontiĝoj kaj kunsidoj, ni emfazis kaj akcentis ke ni devas batali kontraŭ analfabeteco de e-istoj. E-istoj, unue, lernu bone E-on; e-istoj, konsciu ke nia movado estas intelekta movado kaj ke ĉiuj kiuj estas ĉi tie, laŭ la diversaj talentoj, kompreneble -k. ni devas akcepti tion-, devas klopodi pli kaj pli lerni la lingvon, kaj pli kaj pli konatiĝi kun la historio kaj kulturo de la lingvo. Tio estas ege, ege, grava por ni kaj, kompreneble, tiu estas unu el la celoj de nia ĉiutaga, de nia daŭra laboro. Ni ne povas preteratenti tiun gravan aspekton.»

(Julián Hernández, la 13an de junio 1998.)

## Klarigoj ĉiam validas

Juan Ramón Rodríguez Gómez

Delonge, mi instigas niajn samideanojn esplori pri la jam preskaŭ centjara historio de la Esperanto-movado en Kubo kaj mi ĉiam petas precizigi ĉiujn detalojn de la nuntempa agado, por eviti eblajn estontajn vakuojn aŭ dubojn.

Tamen, la plimulto ne zorgas pri tio nuntempe kaj eble kelkaj konsideras ke «la riĉeco de la vivo ne estas en arkivoj, bibliotekoj aŭ tirkestoj, sed en la plej agrablaj momentoj», kiel diris amiko mia, kiam mi parolis pri konservado de historiaĵoj.

Verŝajne, mi scias kiom valoras batali kontraŭ insektoj en iu ajn kolekto da skribaĵoj, kaj samtempe konservi la novaĵojn de nia agado, por ke la vera historio ne perdiĝu kaj por faciligi la laboron al niaj sekvantoj.

### LA DOKUMENTOJ PAROLAS

Ene de nia movado, ĉiuj konas ke, de la 20-a ĝis la 22-a de novembro 1998 sukcese okazis Esperanta Festivalo en Santiago de Kubo, sed neniu sin demandis *kial marki ĝin la 2-a?* Multaj el la partoprenintoj en tiu bonega evento ĉeestis en aliaj du. Ĉu vi ne memoras ilin?, ĉu estis eraro aŭ forgeso de la organizantoj?, ĉu la estraranoj de KEA ne rimarkis tion?, ĉu la historiisto de la Asocio frenezuliĝis?

Ne. Mi povas certigi kaj precizigi ke, en la lastaj 10 jaroj, «la plej agrablaj momentoj» -kaj multaj aliaj- de nia Asocio ne perdiĝis en la aero. Ili vivas en niaj arkivoj, en niaj tirkestoj,... Ne eblas erari, ĉar la historio estas ankaŭ «la riĉeco de la vivo».

Dank' al tio, eblas hodiaŭ reprodukti kvar validajn dokumentojn por rememori niajn du antaŭajn renkontiĝojn ankaŭ «nomumitajn» festivaloj. Jen ili:

17-18 junio

*Unua Esperanto-Festivalo*

*La Unua Nacia Festivalo de KEA estas la celo, kiu koncentras en Santa Klara dum tiuj ĉi tagoj, signifan kvanton de nia tutlanda membraro.*

*Varia programo, kun tre diversa, ĉefe kultura karaktero, transformas ĉi-momente tiun urbon en kernon de la kuba esperantista universo. Muziko, deklamado, libroservo, sportaj kaj amuzaj aranĝoj kontribuos, ĉifoj, plenumi interkonsenton de la Nacia Komitato dum tie lasta kunsido okazinta la 28an kaj 29an de januaro en provinco Kamagvejo.*

*Tiu ĉi estos nova ebleco por demonstri nian movadan forton kadre de ties Deko Datreveno sojle al la 75a Universala Kongreso.*

J. R. Rodríguez

(AVANCO, jaro 1-a, n-ro 1, la 16an de junio, 1989, p. 5.)

17-18 JUNIO

#### Unua Esperanto Festivalo

La Unua Nacia Festivalo de KEA estas la celo, kiu koncentras en Santa Klara dum tiuj ĉi tagoj, signifan kvanton de nia tutlanda membraro.

Varia programo, kun tre diversa, ĉefe kultura karaktero transformas ĉi-momente tiun urbon en kernon de la kuba esperantista universo. Muziko, deklamado, libroservo, sportaj kaj amuzaj aranĝoj kontribuos, ĉifoj, plenumi interkonsenton de la Nacia Komitato dum ties lasta kunsido okazinta la 28an kaj 29an de januaro en provinco Kamagvejo.

Tiu ĉi estos nova ebleco por demonstri nian movadan forton kadre de ties Deko Datreveno sojle al la 75a Universala Kongreso.

J. R. Rodríguez



## LASTAJ KONSIDEROJ

Mi reiras al la unua demando de tiu ĉi artikolo pri la Festivalo en Santiago: *Kial marki ĝin la 2-a?*

Okaze de la X-a datreveno de nia Asocio (fondita la 16an de junio 1979), la Nacia Komitato de KEA decidis celebri Nacian Kulturenan Festivalon en la urbo Sankta Klara, meze de la jaro, kaj reale parto de la kuba esperantistaro renkontiĝis tie (reprezentantoj el Sancti Spíritus, Ciego de Avila, Havano, Urbo Havano k. la sideja provinco)

Tamen, kelkaj jaroj poste, kiam oni ekkomencis plani la realigon de alia Festivalo kaj ĝuste valoris nian agadon dum la lasta jardeko, ni venis en la konkludon ke tiu nomita 1-a ne estis pli ol simpla renkontiĝo, eĉ ne vere nacia, ĉar nur kvin provincoj partoprenis kaj ĝia enhavo estis diversa, kie kulturo aperis kiel parto de la tuto. Do, ne validus konsideri ĝin la 1-a. Ĝi, reale, reprezentas -kaj reprezentos- por ni la unuan pruvon sojle al vera realigo en nia lando de tipaj kulturaj E-festivaloj.

Pro tio, celante ĝustan kronologion kaj seriozan laboron pri la historio de la kuba E-movado, ekde nun ni konsideru:

1-a Kuba Kultura Esperanto Festivalo: Santo Domingo (Villa Klara), inter la 8-a kaj la 10-a de novembro 1991

2-a Kuba Kultura Esperanto Festivalo: Santiago de Kubo, inter la 20-a kaj la 22-a de novembro 1998.★

## Esperanta ekspozicio ankoraŭ rondvojaĝas

Dum majo '98, KEA-anoj pretigis specialan ekspozicion celante ke ĝi iru ien ajn por montri al la ekstera publiko parton de la jam tre riĉa E-literaturo en ĉiuj kampoj.

Sub la titolo **Esperanto: Lengua, Cultura, Movimiento** (Esperanto: Lingvo, Kulturo, Movado), ĝi enhavas pli ol 140 librojn, revuojn, ĵurnalojn, ktp., laŭ la jenaj temoj (hispanlingve prezentitaj): *Kio estas Esperanto?*, *Vivanta kaj funkcipova lingvo*, *Literaturo: originala kaj tradukita*, *Scienco kaj Tekniko*, *Infana Universo*, *Periodoj publikaĵoj*, *Esperanto en Kubo kaj Kubanoj tra la E-ista mondo*, du parte divideblaj (A kaj B) laŭ bezonoj.

Junie, oni ekspoziciis ĝin en la infana kaj junula salono de la Nacia Biblioteko José Martí, kie centoj da personoj interkonatiĝis kun la IL. Same okazis en la sekvaj monatoj, dum ĝia rondvojaĝo pere de tri orientaj kulturaj institucioj, jene:

Bayamo	— 16-an de okt - 6-an de nov/98 (A).
Santiago de Cuba	— 20-an de nov - 25-an de nov/98 (B).
Conframaestre	— 24-an de nov/98-10-an de feb/99 (A).
Guantánamo	— 14-an de dec - 19-an de dec/98 (B).

Revenante al U. Havano, ni denove muntos ĝin en la Nacia Biblioteko, ĉikaze en la akcepta salono, dum III-a Nacia Kongreso de KEA (inter la 11-a kaj 13-a de marto/99), okazonta en tiu grava institucio.

★



## LASTAJ KONSIDEROJ

Mi reiras al la unua demando de tiu ĉi artikolo pri la Festivalo en Santiago: *Kiuj marki ĝin la 2-a?*

Okaze de la X-a datreveno de nia Asocio (fondita la 16an de junio 1979), la Nacia Komitato de KEA decidis celebri Nacian Kulturajn Festivalojn en la urbo Sankta Klara, meze de la jaro, kaj reale parto de la kuba esperantistaro renkontiĝis tie (reprezentantoj el Sancti Spiritus, Ciego de Avila, Havano, Urbo Havano k. la sideja provinco)

Tamen, kelkaj jaroj poste, kiam oni ekkomencis plani la realigon de alia Festivalo kaj ĝuste valoris nian agadon dum la lasta jardeko, ni venis en la konkludon ke tiu nomita 1-a ne estis pli ol simpla renkontiĝo, eĉ ne vere nacia, ĉar nur kvin provincoj partoprenis kaj ĝia enhavo estis diversa, kie kulturo aperis kiel parto de la tuto. Do, ne validus konsideri ĝin la 1-a. Ĝi, reale, reprezentas -kaj reprezentos- por ni la unuan pruvon sojle al vera realigo en nia lando de tipaj kulturaj E-festivaloj.

Pro tio, celante ĝustan kronologion kaj seriozan laboron pri la historio de la kuba E-movado, ekde nun ni konsideru:

1-a Kuba Kultura Esperanto Festivalo: Santo Domingo (Villa Klara), inter la 8-a kaj la 10-a de novembro 1991

2-a Kuba Kultura Esperanto Festivalo: Santiago de Kubo, inter la 20-a kaj la 22-a de novembro 1998. ★

## Esperanta ekspozicio ankoraŭ rondvojaĝas

Dum majo '98, KEA-anoj pretigis specialan ekspozicion celante ke ĝi iru ien ajn por montri al la ekstera publiko parton de la jam tre riĉa E-literaturo en ĉiuj kampoj.

Sub la titolo **Esperanto: Lengua, Cultura, Movimiento** (Esperanto: Lingvo, Kulturo, Movado), ĝi enhavas pli ol 140 librojn, revuojn, ĵurnalojn, ktp., laŭ la jenaj temoj (hispanlingve prezentitaj): *Kio estas Esperanto?, Vivanta kaj funkcipova lingvo, Literaturo: originala kaj tradukita, Scienco kaj Tekniko, Infana Universo, Periodaj publikaĵoj, Esperanto en Kubo kaj Kubanoj tra la E-ista mondo*, du parte divideblaj (A kaj B) laŭ bezonoj.

Junie, oni ekspoziciis ĝin en la infana kaj junula salono de la Nacia Biblioteko José Martí, kie centoj da personoj interkonatiĝis kun la IL. Same okazis en la sekvaj monatoj, dum ĝia rondvojaĝo pere de tri orientaj kulturaj institucioj, jene:

Bayamo	— 16-an de okt - 6-an de nov/98 (A).
Santiago de Cuba	— 20-an de nov - 25-an de nov/98 (B).
Contramaestre	— 24-an de nov/98-10-an de feb/99 (A).
Guantánamo	— 14-an de dec - 19-an de dec/98 (B).

Revenante al U. Havano, ni denove muntos ĝin en la Nacia Biblioteko, ĉikaze en la akcepta salono, dum III-a Nacia Kongreso de KEA (inter la 11-a kaj 13-a de marto/99), okazonta en tiu grava institucio.

★

## Eltiru plej bonajn spertojn...

*(Parolado de Julián Hernández Angulo, prezidanto de kuba Esperanto-Asocio, dum la solena inaŭguro de la 2-a Kuba Kultura E-Festivalo.)*

Estimataj invititoj :

Estimataj samideanoj :

Pluraj diversaj ideoj ofte venas al la menso de la ĉefaj aktivuloj de la asocio tra la lando por pli-evoluigi, disvastigi kaj sukcesigi Esperanton inter ni. Kelkaj tiuj ideoj estas modestaj, kelkaj ambiciaj, kelkaj tre bonaj. Al tiu lasta grupo apartenas la ideo okazigi kulturenan festivalon en Santiago de Cuba en 1998, kiu naskiĝis en la lasta sesio de la 13-a komitatkunsido okazinta en Havano en 1996.

Tiam 1998 kaj la festivalo ŝajnis io tre malproksima, tre fora, tamen ni, ĉefe santiĝanoj, eklaboris por sennebuligi la ideon kaj pli konkretigi ĝin.

La vivo daŭre montras al ni ke la tempo pasas rapidege. Hodiaŭ la festivalo alvenas, hodiaŭ la festivalo frapas la pordon de nia asocia domo kaj la kuba esperantistaro kore bonvenigas ĝin, ĉifoje kaj ne hazarde en Santiago de Cuba kie la movado daŭre kaj stabile marŝas antaŭen, kie la movado entuziasmas, kie estas veraj motoroj de nia esperantista movado.

La naciaj estraranoj kaj la preparkomitatanoj petas al vi kapti ĉi okazon por pli interamikiĝi, praktiki la lingvon kaj pli esperantistiĝi.

Ankaŭ mi deziras ke vi ne nur ĝuu la programon sed ankaŭ klopodu eltiri kiel eble plej multajn spertojn, tiel ke reveninte hejmen vi apliku ilin por pli atingi kaj vivigi la laboron en viaj respektivaj filioj. Ni ne serĉus la sukceson de la festivalo en la festivalo mem. La festivalo estos pli sukcesa se ni kapablas poste plifortigi nian kulturenan agadon, se ni iom post iom interesigas niajn lernantojn kaj progresantojn pri la historio kaj kulturena valoro de Esperanto .

Ni memoru ke niaj kursoj ankaŭ povas esti fonto de kultureno krom la lecionoj, la instruistoj disvastigas kaj elstarigas la figuron kaj la verkojn de Zamenhof kaj de ĉiuj esencaj kaj nepraj kolonoj de nia hieraŭa kaj numtempa komunumo.

Nun ni povas aserti ke Esperanto estas kulturena fenomeno, estas ĉar ekde 1887 pluraj esperantistoj, konsciaj pri la bezono solidigi kaj avancigi la lingvon, laboregis

(Daurigas en la paĝo 10.)



## Gratulojn,




## Santill n!

**Historio de la esperantista movado en Camag ey**, hispanlingva kronologio (1905-1997) verkita de Jorge Luis Gonz lez Santill n, gajnis la Premion en la unua etapo de la konkurso «XX-a datreveno de KEA», lan ita je la komenco de 1998, celante havigi al ni lokajn konitaĵojn pri la E-ago. Ankaŭ, KEA rekonis la laboron de Reinerio Labrada Carabailoso pro sia raporto pri tiu afero en Manzanillo.

Tiu ĉi skribaĵo estas rezulto de longa kaj serioza laboro de la aŭtoro, pere de la serĉado de dokumentoj, tekstoj, ktp., en bibliotekoj, arkivoj kaj personaj kolektoj, krom atestoj de Raŭl Ju rez Sede o (Honora Membro de KEA kaj de UEA), Vctor Gispert Garc a kaj Edilberto Rodr guez Ac n.

Tiu ĉi teksto estas la unua el lokaj filioj. Antaŭajn seriozajn laborojn samce-lajn -sed naciskale- ankaŭ entreprenis Juarez Sede o kaj Alberto Fern ndez-Calienes Barrios (eksa vicpre-zidanto de KEA), je la 80-aj jaroj, sed bedaŭrinde tio neniarn venis en kompletan aŭ skizan

skribaĵon por la sekvantoj. Krom Gonz lez Santill n, nur la ĉefredaktoro de la KEA-informiloj -samtempe, komisiito pri Historio-sukcesis verki kaj diskonigi tekstojn pri tiu temo, sub la titolo **La E-movado en Kubo** (unua kaj dua skizoj, elĉerpitaĵoj), en la jaroj 1994 kaj 1996, respektive.



Vere, Santill n reagis per ampleksa materialo. La konkurso metis minimuman limon (5 tridekliniaj paĝoj, je du spacoj kaj 60 tajpofrapoj po linio, kaj dokumentoj laŭ eblus), sed li sendis presitan libreton 24-paĝan kaj pli ol 50 fotoj el aranĝoj, dokumentoj, ekspozicioj, diplomoj, ktp..

Laŭplane, la Premio konsistis la jenon: senpaga partopreno en la 2-a Kuba E-Festivalo, publikigi

la verkon en **Avanco** kaj donaco de libroj, gazetoj kaj aliaj E-materialoj. El ili, ĝis nun, li nur ricevis la lastan; ankoraŭ KEA ŝuldas al li la unuan aferon; kaj, pro la kialo ke la teksto estas pli granda ol nia gazeto, ne eblas diskonigi ĝin per tiu ĉi informilo.

Krome, oni bezonus tradukon por

diskonigi ĝin ĉi tie. Rezulte, ni publikigos la tuton (je partoj) en venontaj eldonoj, kiel kunlaboro de ĝia aŭtoro por pliriĉigi ilin; kaj ni atendas estontan eldonon kun

la tuta kolekto kaj poste meti ĝin kiel parto de la **Historio de la E-movado en Kubo**.

Gratulojn kaj dankojn, Santillán! ★

Dua etapo de la konkurso

## La tempo urĝigas nin

Alproksimiĝas la limo de la konkurso «XX-a datreveno de KEA» (dua etapo). Pro tio ni rememoras la detalojn por eblaj interesiĝantoj:

1.- Limdato: 30an de aprilo 1999.

2.- Teksto (esperante aŭ hispanlingve).

3.- Minime dek (10) tridekliniaj paĝoj, tajpitaj je du spacoj kaj 60 tajpofrapoj po linio (tio ne inkludas fotojn aŭ aliajn dokumentojn, nek referaĵojn k. bibliografion, kiuj ankaŭ bezonatas por pliriĉigi la tekston kaj fari ĝin pli scienca).

4.- Oni diskonigos la rezultojn la 14an de majo, okaze de la 71a datreveno de la prezento de **La problemo de helpa lingvo kaj sia solvo: Esperanto**» (hispanlingve), doktora tezo je Filozofio k. Belletoj, fare de Elías J. Johns, en la Havana Universitato, kiu okazis la 14an de majo 1928.

5.- Premioj:

-**Unua**: Semajnfina restado (kvartaga) en turisma centro; eblas inkludi akompanant(in)on, se la gajnonto estas E-ist(in)o. Krome, invito al centraj aranĝoj por la XX-a datreveno de KEA (fondita la 16an de junio 1979). La Komisiono, ankaŭ publikigos la verkon (laŭeble, en **Avanco**) kaj la gajnonto ricevos librojn, gazetojn kaj aliajn E-materialojn.

-**Dua**: Semajnfina restado (tritaga) en turisma centro, publikigo de la verko en la Oficiala organo de KEA (laŭeble), 200 kubaj pesoj, kaj esperantaĵoj.

-**Tria**: Publikigo de la teksto (je samaj kondiĉoj kiel la aliaj), 200 kubaj pesoj, kaj esperantaĵoj.

Aldonendas ke la premioj estos unikaj. Kaze de teama gajnonto, ili devas decidi la ricevonton aŭ kiamaniere ili faros tion.

Oni sendos la verkojn al:

Juan Ramón Rodríguez Gómez  
Apartado 5120, CP. 10500  
Ciudad de La Habana. ★

## Eltiru plej... (Daŭrigo.)

por injekti kulturon al ĝi. Indas ke la nomoj de Antoni Grabowski, Vasily Devjatnin, Felix Zamenhof, Kazimir Bein (Kabe), Antoni Kofman, Kalomano Kalocsay, Edmond Privat, Julio Baghy, Gaston Waringhien, William Auld, Marjorie Boulton, Claude Piron, Itsvan Nemere, Ivo Lapenna kaj multaj aliaj estu pli familia por nia esperantistaro.

Indas ke **Ho' mia kor, La Espero, Preĝo'sur la verda standardo, La Vojo, Tagiĝo, La Infana Raso, Elpafu la sagon, Faktoj kaj Fantazioj**, kaj aliaj literaturaĵoj vivu kaj vibru en niaj kursoj kaj aranĝoj. Indas ke ni ĉiuj scius kiom multe laboris sur la tradukkampo, Zamenhof kaj aliaj elstaraj esperantistoj por sukcesigi la lingvon kaj prui ke pere de ĝi eblis esprimi ĉiujn nuancojn de la homa penso.

Esperanto estas ĉies kaj nenies propraĵo. Esperanto estas ponto inter kulturoj. Ni serĉu talentojn, ekspluatu nian kulturen potencialon, verku kaj traduku poemojn, rakontojn, teatraĵojn kaj kantojn por pliriĉigi la kulturon de la internacia Esperanto Komunumo. La historio de Esperanto en Kubo estas ja parto de la monda esperantista historio. Ni daŭrigu verkante la historion de Esperanto en nia lando kun la streboj, klopodoj, talentoj kaj manoj de ĉiuj ĉar tiel ni pliriĉigos la Universalan Zamenhofan kulturon.

La kampanjo 2000 vokas nin levi la organizan kaj idean nivelon de la Esperanto-Komunumo, levi la prestiĝon de la internacia lingvo kaj influu la internacian vivon. Ni energie kaj entuziasme laboru ĉiutage por ke la supre menciitaj celoj fariĝu bela kaj valora realo en Kubo, en Ameriko Norda, Centra kaj Suda kaj en ĉiuj kontinentoj.

Ege bonvenaj esta la alilandaj esperantistoj kiuj regalias nin per sia partopreno en la Festivalo. Al ili ni esprimas niajn plej sincerajn amikajn sentojn.

Ni prenu la manojn kaj forte ĉirkaŭbraku ĉiujn kiuj malfermis pordojn kaj ebligis solvojn por la okazigo de tiu ĉi evento, ĉefe al funkciuloj de la Ministerio pri Kulturo de tiu ĉi historia kaj heroo provinco, inter ili la kamaradoj Francisco Miyares kaj Emilio Mendoza.

Specialaj meritoj kaj laŭdoj por la membroj de preparkomitato kiuj laboregis por organizi ĉion ĝisdetale kaj sukcesigi la festivalon.

Ĝuu la programon de la Festivalo, dividu niajn opiniojn kaj ideojn kun la aliaj, eltiru plej bonajn spertojn de ĉiu programero kaj lasu ke la noblaj idealoj de Zamenhof pli vivu kaj vibru inter ni dum tiuj ĉi tagoj.



Koran Dankon.



## Eĥoj el Santiago

*Juan Lázaro Besada Toledo / Fotis: Maritza Gutiérrez kaj Alejandro García*

De la 20a ĝis la 22a de novembro 98, ni partoprenis en la 2-a Kultura E-Festivalo, en Santiago de Kubo. Ankaŭ, tintas en mia cerbo kaj en miaj oreloj la sonoj de tiu ege bonkvalita aranĝo, kie tuta fasko da surprizoj embuskis min. Permesu al mi dividi ilin kun la legantaro de Avanco.

Jam dum la Solena Malfermo -en la tre konvena k. arkitekture belega Salono de Ceremonioj de la Placo de la Revolucio-, la 11-jara knabino María Angélica Bustamante, el la municipa grupo Contramaestre, frapis la koron de ĉiuj ĉees-tantoj per kantado kun fortika kaj kolorriĉa voĉo. Tiu lernantino de Esperanto plorigis plurajn homojn kaj fa-

riĝis la nedisputebla stelo de la Festivalo, pro siaj ĉarmo kaj rava personeco. Angélica ankoraŭ lernas la IL-on, sed oni povas aserti ke ŝi multon povos kontribui al la kulturo de nia lingvo.

Plia kaj tre agrabla surprizo estis la muzikensemblo Anĝel', el la urbo Guantánamo. Tiuj kvar gejunuloj vere impresas, el muzika vidpunkto kaj se ili polurigus la tekstojn, sendube kvaliton havas la ensemble por sukcese prezenti sin en kiu ajn internacia scenejo. La reĝisorino de la grupo, kiu estas samtempe la kantistino, havas belan voĉon al kiu nur mankas io pli da kultivado, ĉar talento pli ol sufiĉas al ŝi.



**María Angélica: nova stelulino de KEA**

La juna kantisto Dayron Pérez, el Ba-

jamo (provinca filio Granma) havas agrablajn voĉon kaj simpatian personecon. Pro la juneco (14-jara), mankas al li ankoraŭ tekniko, sed ĝin li perfekte povos havigi el si per daŭra studado.

Tute apartan mencion meritas la laboro de Isnel Pupo, el Holguín, kies pup-teatra prezentado estas inda je kia ajn laŭdo. Li majstre scias ludi per la pupoj kaj, dum la tuta daŭro de sia aktorado, li kaptis la atenton de la ĉeestantaro. Li nur bezonas pli funde prilabori la tekstojn el lingva vidpunkto, ĉar ĉio alia -laŭ mia juĝo- estas vere alloga.

Ankaŭ la infanoj kiuj rolis, dum la infana spektaklo, meritas laŭdojn, pro la nekutima kvalito kaj seriozeco de ilia laboro.

Substrekindas la ekspozicio pri karikaturoj, de la santiagano Vicente Rodríguez, kies ideoj estas riĉaj kaj vere tre spritaj. Ilin oni aperigos libroforme, danke al la helpo de Kim J. Henriksen, prezidanto de Dana Esperanto-Asocio, kiu donacos la paperon por la eldono.

Cetere pri Kimo -kiel oni baptis lin intern- eblas diri ke li konkeris la favoron de la kuba esperantistaro per siaj du prezentadoj. Akompanate de sia akordiono, li regalas nin per kantoj el kiuj unu -dediĉita al IJK- jam kirlas en la kapo de nia samideanaro. Krome, pere de danca spektaklo kiun li nomis **La hundo diras hau, hau**, Kimo vere brilis kiel aktoro, ĉar liaj esprimivaj gestoj kaj mieno havigis al li elkorajn aplaŭdojn. Tute certe, al kubanoj ne facilos forgesi tiun majstran spektaklon, unu el la plej brilaj dum la tuta Festivalo.

Same valora -ne nur pro la gesto, sed

ankaŭ pro la enhavo- estis kontribuo de la belgo Eddy Raats, plurfoje vizitanto de nia lando, kiu anoncis grandan librodonacon por la tuta enlanda esperantistaro.

Denove tre ŝatata montriĝis la Deklamkonkurso, kiun aliffoje sukcesis venki Pedro Enrique Peña, el Santiago de Kubo, per verva kaj brila aktorado.

Se la arta programo de la Festivalo estis tre sukcesa, ankaŭ la teoria vere fruktodonis. Ĉiuj prelegoj havis tre altan nivelon kaj la temoj -same kiel la nomoj de la prelegintoj- atestis pri tio. Jen ili:

-Juan Lázaro Besada: *Esperanto kaj la internaciaj rilatoj kaj Alproksimiĝo al la kuba E-kanzonistiko.*

-Juan Ramón Rodríguez: *La E-movado en Kubo kaj Fernando Ortiz kaj sia favora agado por Esperanto.*

-Maritza Gutiérrez: *Pri la poetika arto de José Martí.*

-Fernando Paredes: *Rilatoj inter piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj Esperanto. Ĉu E-o piĝiniĝos?*

-Eddy Raats: *Legendoj el Belgio.*

-Héctor Jiménez: *Instruado kaj kulturo. Gravaj ĉeneroj por profitplena poresperanta laboro.*

Krome, la Ronda Tablo pri Kulturo, kiun partoprenis elektita grupo da festivalanoj -el inter kiuj mi menciis la nomon de Alex Humet, el Belgio-, funde traktis diversajn aspektojn de la temo, lasante en ĉiuj ĉeestantoj ne nur instruojn, sed agante ankaŭ kiel sprono por pluvoji sur tiu kampo, kiu estas esenca faceto de nia lingvo.



Kompreneble, ne mankis distroj kaj amuzeblecoj ene de la Festivalo. Ĉiuvespere, ĉu en la komuna loĝejo ĉu aliloke, estis ebleco danci, drinki, amindumi, ĝui. La organizantoj ne forgesis la plej minimuman detaleton, tiel ke la tuta aranĝo fariĝis festo de la esperantistaro.

La partopreno de gesamideanoj el Belgio, Danio, Germanio, Islando kaj Usono, donis internacian karakteron al la Festivalo kaj konatigis la novulojn kun la komunikeblecoj de tiu ĉi lingvo.

Entute, oni povas diri ke, dum tiuj tri novembraĵoj, al varmo de la santiaga suno aldoniĝis tiu de la suno kiun portas esperantistoj en la koro.


Ĉie tra la urbo estis videblaj afiŝetoj rilate la eventon kaj la diversaj amasko munikiloj vaste raportis pri ĝi, kio es-

tas rimarkinde maksimuma kaj laŭdinda trafo. Eĉ la aktorino Georgina Almanza, bone konata pro sia partopreno en universalaj kongresoj, estis intervjuata de la televidstacio en Santiago de Kubo, kio ja ege utilis al plia informado pri la lingvo.



Apartan mencion kaj dankemon meritas s-ro Emilio Mendoza, funkciulo de la Ministerio pri Kulturo surloke, kiu dum la tuta evento estis apud kaj helpis solvi eĉ etajn detalojn. Liaj sinteno k. daŭra helpo havigis al ni veran amikon, kaj ni ne povas ne agnoski tion k. varmakore lin aplaŭdi.

La Festivalo pasis, sed eĥas en niaj koroj la travivaĵoj. Ni nur esperas ke ties postsekvoj utilis por ke E-o floru, burĝonu kaj kresku daŭre ĉe ni.

Dankon, Santiago! Restu fiera, ĉar ni neniam forgesos vin!







### Soneo No. 6

Aŭtoro: Nicolás Guillén  
Esperantigis: Maritza Gutiérrez

Jorubas mi, mia plor' jorubas  
Lukumi'  
ĉar mi estas jorubo el Kubo  
mia vol', ĝis Kubo iru mia plor' Joruba  
supren iru la ĝoja kant' joruba  
fluanta el mi.

Jorubas mi  
kante iras mi  
plore iras mi  
kiam ni ne jorubas  
estas mi kongo, mandingo, karabali'  
mia sone' elvoĉas tiel. atentu amik'

Ludo-diveno  
de la espero  
kio mias vias  
kio vias mias  
la sango tuta  
riveron igas.

La bombakso, kun sia hup', bombakso  
la patro, patro kun sia knabo,  
la ĵikote' en sia karapaco.  
La varma soneo sonu,  
ĝin dancu la homoj  
bruston sur brusto  
glaso kun glaso  
kaj akvo kun akvo, kun  
kanbrando!

Jorubo mi estas kaj lukumi'  
mandingo, kongo, karabali'

(Daŭnigas)










Illustration: Carlos Varada & Co.





mia sone' plu kantas tiel,  
[atentu amik'




Ekde lontane ni estas kunaj  
junul', oldul'  
negroj kaj blankoj, ĉiuj miksitaj  
unu reganto, regato alia  
ĉio miksitaj.

Sankt' Berenito, alia regato  
ĉio miksitaj  
ekde lontane, negroj kaj blankoj  
ĉio miksitaj.

Sankta Maria, alia regato  
ĉio miksitaj  
ĉio miksitaj, Sankta Maria  
Sankt' Berenito, ĉio miksitaj  
ĉio miksitaj, Sankt' Berenito  
Sankt' Berenito, Sankta Maria  
Sankta Maria, Sankt' Berenito  
ĉio miksitaj

lorubo mi estas kaj lukumi'  
mandingo, kongo, karabali'  
mia sone' finiĝas tiel, atentu amik':

Mulato venu  
la ŝuon jetu  
diru al la blanko, li ne foriros  
de tiu ĉi loko neniu disiĝos  
senhalt' rigardu  
senhalt' vi ardu  
senhalt' vi trinku  
senhalt' vi manĝu  
senhalt' vi vivu  
ĉar mia soneo ankaŭ  
[ne haltos.



Esploru ĉiujn vortojn en ĉi tiu



FOR MODELO, PER ATENTU

# ESPERANTO

## TRIA NACIA KONGRESO DE KEA

*Kiel anoncite en la unua bulteno inter la 11<sup>a</sup>-13<sup>a</sup> de marto 1999 Havano farigos renkontiĝejo de landaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Kuba Esperanto-Asocio invitas vin partopreni la Trian Nacian Kongreson kiu oflan fofon evidentigos la viglon kaj entuziasmon de la kuba esperantistaro.*

*Sajle al la Tria Jarmilo la kongresa programo enhavos kernajn temojn kiuj certe altiros ĉies atenton per klerigaj eroj, prelegoj, rondaj tabloj, forumo pri la rolo de Esperanto en la tria jarmilo, turismado kaj artaj vesperoj kiuj prezentos al la kongresano maturan kaj samtempe junan movadon.*

*Por eksterlandaj kongresanoj KEA organizos antaŭ aŭ postkongresan restadon por turismi, viziti interesajn lokojn, ekspresajn kursojn, kaj aliajn isoj antaŭmendoj.*

*La kongresejo estos la Nacia Biblioteko de Kubo, ampleksa, ne luksa, sed prestiĝa kultura loko de nia lando. Tie ni disponos je komfortaj kaj modernaj salonoj, granda halo por ekspozicio, teatro kaj kafeterio.*

*Kuba Esperanto-Asocio invitas vin partopreni la Trian Nacian Kongreson de la kubaj esperantistoj sajle al la Tria Jarmilo.*

*¡Ni atendas vin en Havano kongrese!*

*Kongresa Preparkomitato*

## KVARA TUTAMERIKA KONGRESO Bogoto, Kolombio, Januaro 27- Februaro 3, 1999 ESPERANTO KAJ LA TRIA JARMILO

### CELOJ:

1. Antaŭenigi la daŭran disvastigadon de E-o tra nia kontinento.
2. Instigi al plibonigo de la uzo de E-o inter la Tutamerika Esperantistaro.
3. Laŭ niaj ebloj, kontribui al la atingado de la jenaj celoj de la kampanjo 2000:
  - a) Levi la organizan kaj idean nivelon de la E-komunumo.
  - b) Levi la prestiĝon de la internacia lingvo.
  - c) Influi la internacian vivon.
4. Eliri konkludojn kaj interŝangi spertojn por starigi organizajn principojn ĝeneralajn por la venontaj Tutamerikaj Kongresoj.
6. Kontrolli la disvolvigon de la projektoj starigitaj dum la pasintaj Tutamerikaj